Amikeco

Monata gazeto de la
Internacia Esperantista Kolektanto-Klubo,
Sekcio de Migrantaj poŝtkartoj,
Internacia Klubo de Esperantistaj Filatelistoj
Prezidanto: J o s e f G r o e b e l .
Administrado: Koblenz am Rhein, Eltzerhofstr.5
Poŝtŝekkonto: Köln 37957

N-o.9 Septembro 1925 2.jaro.

Abonprezo: po jaro 1 U.S. Dolaro.
Anoncprezoj: 1 pag'o 6 U.S. Dolaroj, ½ pag'o 3½ U.S. Dolaroj, ¼ pag'o 2 U.S. Dolaroj. Malgrandaj inters'ang'anoncoj c'iu vorto 5 orpfenigojn. Fino de la akcepto de la anoncoj po la 25 a de monato.

LA UNUAJ IL. FLUGPOŜTKARTOJ estis eldonataj en Danujo, kaj tio eble estas ne konata al kolektantoj kaj flugpoŝtkolektantoj. Tiuj-ĉi kartoj portas en la malantaŭa pag'o la bildon de voturanta aeroplano kaj supre "Fra Boltflyvningen 1911 t.e.(de la Beltflugado)1911 De tiuj-ĉi kartoj estis presataj 200 ekzempleroj kaj estis vendataj je prezo de 2 danaj kronoj. Nur 150 ekzempleroj estis forsendataj, do la restaĵo ŝajnas esti perdita. La enspezo estis destinita,por la pago de la kostoj de la flugado. La piloto „Robert Svendsen" ekforflugis la 2./9. 1911 vespere je la sepa kaj dek minutojn pli poste trans la „Belt" atingis Fredericia. Tie-ĉi li faligis la poŝtkartojn, kiuj presitaj per la stampilo de tiea poŝtofico „Fredericia -2.9.11.6-8 E.",estis forsendataj.

LA NORVEGAJ POLUSOMARKOJ.

En Aprilo aperis en Norvegujo la Polusomarkoj kiuj ne havas poŝtan celon kaj prezentas spekulacieldono de unua klaso. 50000 seriojn en valoro de 2-25 Oere vendis la poŝtoficejoj kaj la reston de 250000 serioj prenis sur sin la „Luftseiladsforening" je prezo de 180 000 kronoj. La Polusomarkoj nur celas financan apogon de la nordpolusa flugado de la s-ro. Amundsen

LA HISTORIO DE LA LETERO.

De Ing. O.Schwarz, A-ano 13.

Tiel rapide, kiel la poŝtmarko, la poŝtletero ne povis aimiliti la mondon, ĉar por la poŝtmarko, la eltrovaĵo de la letero estis donata. Por ni filatelistoj, la konado de la estiĝeco kaj perfektiĝeco de la letero estos tiel de granda interoso, kiel la pm. estas estinta en la mallonga tempo de ĝia okzisteco.

La letero devis permigri de ĝiaj prakonemoj grandajn artojn kaj industriajn epokojn antaŭ ol ĝi atingis ĝian celon.

Antaŭen de tute agas sin per la patrino de la lingvoj (t.e. la skribo) aŭ reciproke por la lingvo - la patrino de la skribo. La nuna skribo estis la bildskribo kio estis rosata de sovaĝaj popoloj, por komprenigi sin. Sur pramaljunaj ŝtonoj aŭ en kavernoj, batataj signoj hodiaŭ ankoraŭ trovas sin en multaj lokoj kiel pruvo ke ankaŭ da miljaroj jam bezonaĵoj ekzistis komprenigi sin.

La egyptuja signoskribo (Hieroglyphen-skribo) kaj la kojnoskribo jam montras al ni la progreson en arto kaj scienco. Tiuj skriboj estis legataj de niaj sciencistoj. La popoloj persaj, precipe grekaj, romaj kaj semitaj jam konis kaj bezonis la literajn skribojn.

La nunaj poŝtsignoj certaj estas de Hebreoj. Estas la leĝotabuloj de Mozeo. De tie - ĉi la literojskriboj disvastiĝis. De romanoj, ĝi venis al Galio kaj Hispanujo, malfrue kontraŭ nordo ĝis Britujo. La nuna skribo konata de la nordaj popoloj estis la Runenskribo. En jaro 360 post Kristo, la episkopo Alfilas eltrovis la gotan alfakton (en traduko de la biblio), al kio sekvis en Germanujo kaj Francujo la latinan afabeton.

Kiel la plej maljunan leteron, Diodor, signis skribaĵon, kiun la reĝo hinduja devis skribi al la reĝo asira, Semiramis. Depost pli novaj esploroj, la reĝino Atossa travas la honoron de la eltrovaĵo. Ŝi estis la filino de Hiros kaj la patrino de Xerxes.

Jam la plej maljuna historio de Egyptujo konas la leteron kaj en biblio estas la diraĵo de plej ofte leteroj sciigoj, per kio leteroj estis dissenditaj per kuristoj.

Grandan divastig'on, tabuletoj lignaj aŭ eburaj havis, sur kiuj estis tavolon de vakso kaj sur kiuj estis skribitaj. Romanoj nomis iliu „tabellae" kaj la leterportiston „tabellarius". Se la skriboj estis legataj, tiel la vakso estis varmumata kaj ree glate farata, kion oni nomis „tabula rasa". Ankoraŭ en jaro 1313 la salobolistoj bezonis komune tiojn tabubelojn.

(Daŭrigota)

*

Ĝis nun alvenis jenaj gazetoj!

Bulgara Esperantisto n-o.11/12,

International Language n-o.8

Literatur Mondo n-o.5

*

Nigra listo.

D-ro Stilianos Paraskevas en Konstantinoplo, (Turkujo), Pera, Rue Souterazi Kartal, ne respondas interŝang'sendaĵojn.

AVERTO.

Ĉiuj en n-o. 6 de la Amikeco nomitaj membroj kiuj g'is nun ne estas postpagintaj ¼ U.S. Dolaron estas petataj tuj pagi. Tiuj eksterlandaj membroj estas petataj sendi tuj 4 internaciajn respondkuponojn al la prezidanto.

Alle deutschen Mitglieder, die gemäß der Bekanntmachung in der Juniausgabe der „Amikeco" die Nachzahlung von 1,00M (unter Benutzung der mitgsandten Zahlkarte) noch nicht geleistet haben, werden gebeten, dieses bald zu tun. Die bis zum 1.Oktober noch nicht eingegangenen Beträge werden durch „Postnachnahme" erhoben.

*

NOVAJ POŜTMARKOJ.

Ĉeĥoslovakio: 30 h. viola en kolombodesegno; Ĵurnalmarko 5 h. sur 2 h. verda, surpreso violblua; pagomarko 60 h. sur 250 h. orang'a, surpreso violblua. (Sciigo de s-ro O. Schwarz, Aussig/Elbe.)

*

NOVAJ MEMBROJ.

327. Polička, Jungmanova 325. Ĉeĥoslovakio, s-ro Frederiko Jndra, a.b.Mi. 1.

328. Budapest, I Alkotas-str.31, III/4, Hungarujo s-ro Aleksandro Spitzer, a,b,e.
